

La Esperero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN

OKTOBRO 1980
68-A JARKOLEKTO

6

ISSN 0014-0694
FONDITA EN 1913

SEF revenas al la centro

Post sep aŭ ok jaroj en Enskede la oficejo de SEF reiras al la centro de Stokholmo. Ek de la 1a de novembro do ni havas novan adreson kaj novan telefonan numeron, kiujn vi trovas en kadro ĉi apude. Kial ĉi tiu transloĝiĝo?

La nunaj lokaloj de SEF havas kelkajn avantaĝojn, sed la granda malavantaĝo estas, ke ili estas en la periferio de la ĉefurbo kaj ne tre facile troveblaj. Per la metroa fervojo oni rapide atingas ilin, sed situo duonan etaĝon suben, en kvietaj antaŭurba medio ne estas ideala por oficejo, kien oni facile trovu la vojon.

Ankoraŭ unu faktoro igis SEF serĉi novan ejon: la nuna fariĝis tro malgranda. 55m² estis abunda spaco, kiam SEF ekokupis la nunajn ĉambrojn, sed aĉeto de maŝinoj por la plivastiganta agado, kaj decido pri akiro de pliaj maŝinoj devigis al serĉo de taŭga ejo pli centre.

La ejo, kiun oni serĉis, devus povi esti uzata por diversaj celoj: por oficejo, kompreneble, sed tre volonte ankaŭ por informa centro kaj por rekta vendado de libroj pri kaj en esperanto.

La ejo devus sekve situi je la stratnivelo, esti pli granda ol la nuna, ne multe pli multekosta, kaj situi centre. "Malfacila bonbono", kiel iu emus esprimi sin. Sed ŝajnas, ke tiu "malfacila bonbono" estas trovita. Brunnskatan troviĝas tute centre en la urbo, ĝi ja estas paralela kun Kungsgatan. Numero 21 troviĝas preskaŭ je la angulo kun Regeeringskatan, do tute facile atingebla. La plej proksima metroa stacio situas ĉe Hötorget. Jam tio povas indiki al vi la




centrecon, se vi iom orientiĝas en Stokholmo.

La ejo kompreneble ne situas sur Kungsgatan aŭ Regeeringskatan. Brunnskatan estas multe pli kvietaj strato (ĝi etendiĝas inter Malmskillnadsgatan kaj Birger Jarlsgatan), nun rekonstruata laŭ sia tuta longo je la mala flanko de la vojo (la flanko de la paraj numeroj). Post la rekonstruo ĝi estos tute moderna, pli larĝa kaj eventuale kun pli da butikoj. Ĝuste nun ĝi estas tre brua dum la tago pro ĉiuj konstrumaŝinoj. Tiom pri la situo.

La ejo mem estas je la stratnivelo ĉirkaŭ 60m² vasta. Je la strato ĝi estas 7m larĝa kaj havas du montrofenestrojn. La profundo estas de ĉirkaŭ 10m. Al la ejo apartenas unu etaĝo sube, kiu estas 35—40m² vasta. Tiu kela etaĝo estas uzata kiel kunvenejo (por kunsidoj kun maksimume 10 partoprenantoj), por la biblioteko de SEF kaj por arkivo/stokejo. Ankaŭ kelkajn maŝinojn oni povos lokigi ĉi tie.

La stratetaĝo taŭgas, kompreneble, tre bone por eta vendejo kaj por "informa angulo", ambaŭ plej proksime al la eniro. Pli interne oni devos trovi lokon por "oficejo" kaj por la nova presejo de SEF kaj Eldona Societo. Kiel vi vidas el la desegnaĵo publikigita ĉi apude, oni povas facile dividi la tuton en areojn kun diversaj aktivecoj.

Sed nova ejo ne signifas multon en si mem. Necesos trovi aliajn formojn pri deĵorado en ĝi, kaj necesos trovi ekonomiajn fontojn por pagi ĝiajn kostojn. Pro tio legu atente la svedlingvan alvokon sur la sekva paĝo.



Post la granda kongreso reen al la ĉiutago

El pluraj lokoj venas raportoj pri pli vigla aliĝado al kursoj ol de longe, pri pli vigla aktiveco, pri multaj novaj aliĝoj. Tion oni ŝuldas sendube al la kongreso, sed ankaŭ al ni mem, kiu sciis utiligi tiun kongreson. Sed ni ne faru la eraron, kiun ni tro ofte jam faris: sidi sur la laŭroj. Tiu kongreso estis instiga vitaminpilolo kaj nenio plu. La efiko de ĝi tre rapide forfados, se ni ne daŭrigos labori kiel se jam venontjare devos okazi nova kongreso.

Ni lernis multon de tiu kongreso, ne malplej, ke estas necesa laborado kaj laborado kaj laborado por ke rimarkiĝu rezulto. Rezulto, kiu estas rimarkebla ne nur al ni, kiuj kun ĝojo registras ĉiun etan okazon favoran al esperanto, sed rimarkebla ankaŭ al tiuj, kiujn ni volas konvinki pri esperanto.

Nia nuna laboro ne estos same festa kiel tiu por la kongreso. Temo pri multe pli ĉiutagaj aferoj, pri "lekado de poŝtmarkoj", se ni esprimu tion en komprenebla maniero. Sed ankaŭ tio estas laboro, kiu povas doni rezulton. Tute certe ĝi ne donos grandajn titolojn en la gazetaro; sed ne tio estas nia celo. Grandaj titoloj gravas, tute certe, sed akiro de novaj kursanoj kaj novaj membroj gravas multe pli, same kiel akiro de subteno kaj plivastigo de nia kontaktreto.

Ni tre emas kontentiĝi per atingoj en la gazetaro. Eĉ mencioto pri okazonta aŭ okazinta kunveno estas ĝojo por ni. Kaj ĝi estu! Sed ni ne forgesu, ke tio, kio kalkuliĝas estas tamen la rezulto de nia laboro: la membroj, la kursanoj, la interesitoj kaj informitoj.

La kongreso gravis, ĉar ĝi devigis nin, plejparte iom timemaj civitanoj, preni aron da kontaktoj, kiujn ni ja ĉiam emis fari, sed neniam kuraĝis. Ni esperas, ke ni povos reteni tiujn kontaktojn kaj pluevoluigi ilin, tiel ke esperanto profitos je tio. Sed ankaŭ kontaktoj faritaj sen rilato al la kongreso gravas.

SEJU faris mirindajn paŝojn lastsomere ĉirilate, prenante kontakton kun la lerneja administracio — kontakton, kiun SEF devus esti farinta jam antaŭ jaroj. La laboro de SEJU ne kaŭzis eĉ unu titolon en iu gazeto, sed ĝi povas signifi multon pli ol tuta Universala Kongreso!

Pasis la festo. Reen al la ĉiutago, al la daŭra laboro por esperanto. Ni lernis multon de la kongreso, nun ni utiligu tion.

Franko Luin

Hjälp till!

SEF flyttar till centrala Stockholm till en lokal i gatuplan. Detta är det första resultatet av några månaders planerande (avbrutet av kongressen) av nya verksamheter. Om du läst *La Espero* 1, 2 och 3 för i år minns du säkert begrepp som "AB Esperanto", "EspEko" och "Espro". Den nya lokalen är ett resultat av diskussionerna förda under dessa beteckningar.

En ny lokal i Stockholm betyder ökad verksamhet, ökade insatser, ökade kostnader. Målet är att få fler medlemmar, fler intresserade, bättre förutsättningar att arbeta för esperanto. Detta kostar och kommer att kosta i framtiden.

Innan vi har den planerade ekonomiska verksamheten i gång, måste SEF lita till sina medlemmar. En ny lokal kostar åtskilliga tusenlappar. Det handlar om överlåtelsepengar, om kostnader för uppsnygning och upprustning av lokalema. Bara för nya möbler behöver SEF ca 10 000 — 15 000 kronor (bokhyllor, bord, stolar).

Därför startar SEF en insamling för det nya "EsperantoCentro" som håller på att ta form i Stockholm. Det brådskar: SEFs lilla reservfond är helt tömd och den nya lokalen behöver göras i ordning så snabbt som möjligt. Hjälp till!

Alla bidrag är välkomna. Sätt den summan du kan på postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet. Märk på talongen "EsperantoCentro". Bidragsgivares namn kommer att publiceras i *La Espero*.

Esperantoförbundet

Adress: Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm ★ Telefon: 08 - 11 74 34 ★ Förbundets expedition har öppet måndag — torsdag kl. 17 — 19, (särskast tisdagar) ★ Postgiro: 20 12 - 3 ★ Medlemsavgift: direktanslutet medlem 50 kr, ungdomsmedlem under 26 år 25 kr, familjemedlem (utan tidning) 15 kr ★ Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperantonytt* ingår i medlemsavgiften ★ Medlemmar under 30 år får dessutom ungdomsförbundet SEJUs blad ktp.

La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet ★ Adress: Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm ★ Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg ★ Redaktör: Franko Luin, Myggdalsvägen 123, 135 42 Tyresö, telefon hem 08 -

7128291 ★ Prenumeration: 40 kr per år, postgiro 20 12 - 3, Esperantoförbundet ★ Tidningen utkommer med åtta nummer per år: i februari, mars, april, juni, september, oktober, november och december ★ Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden ★ Fotosats: Esperantoförbundet ★ Tryck: Sturetryckeriet AB, Stockholm 1980

Esperantoförlaget

Postadress: Box 7502, 200 42 Malmö ★ Besöksadress: Möllevångsgatan 20 B ★ Öppettider: 1 sept — 15 maj: onsdagar kl. 10 — 11, torsdagar kl. 17 — 18 ★ Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren ★ Telefon: 040 - 12 20 29 ★ Postgiro: 578 - 5 ★ Expedition: Wivi Nilsson ★ Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

Gravaj decidoj faritaj en Hallsberg

Meze de majo 1980 SEF havis jarkunvenon en Hallsberg. Raporti pri ĝi nun, preskaŭ duonan jaron pli poste, sentiĝas iom ekstertempe, sed tiu jarkunveno tute ne estis sen-signifa (neniu jarkunveno ja estas sensignifa) kaj oni devas raporti pri la gravaj okazintaĵoj en Svedio. Tiu ĉi numero de *La Espero* estas la plej frua en kiu tio eblas. Nu, ek al la raporto.

PLI DA PARTOPRENANTOJ OL ONI ATENDIS

Oni supozis, ke okazigo de Universala Kongreso signifos malmultajn partoprenantojn al la sveda jarkongreso. Tiu supozo montriĝis ĝusta — ĝis iu limo. Fakte venis multe pli da partoprenantoj ol supozite, tiel ke oni povis bone labori kaj decidi pri aferoj, kiuj temas pri la estonta agado de SEF.

Bela vetero akompanis ĉi tiun jarkongreson, kio agrabligis la restadon en Hallsberg. Bonvenigan paroladon faris Sten Gustavsson, kiu baldaŭ pludonis la parolon al Roland Lindblom. Lia interveno temis pri la tiam okazonta Universala Kongreso kaj la jam faritaj laboroj. Pri ĝi ni ne bezonas raporti ĉi tie.

Dum la dua parto de la sabata programo Roland Lindblom kaj Franko Luin prezentis la ideojn, kiuj vekigis dum la diskutoj pri plifortigo de la ekonomia bazo de SEF. Ankaŭ pri tiuj ideoj *La Espero* jam raportis, do ni ne bezonas ripeti ilin.

La vespero fariĝis agrabla kunestado, kiu komenciĝis per vespermanĝo, kiun la komunumo Hallsberg regalis al la kongresanoj, kaj daŭriĝis per varia programo, kiun la klubanoj aranĝis, i a dancado.

LA JARKUNVENO DE SEF

En la dimanĉo okazis la jarkunveno de SEF. La prezidantan martelon svingis Åke Blomberg, kiu rapide trape-netris la agadraporton de SEF. Ankaŭ la elektoj estis rapide traktitaj. Roland Lindblom reelektiĝis kiel prezidanto por ankoraŭ unu jaro. Kiel ordinara membro de la estraro reelektiĝis Märtha Andréasson; novaj membroj fariĝis

Anita Lindblom kaj Birger Viggen. Linnea Edsenius estis reelektita kiel anstataŭanto.

Ĉiuj revizoroj reelektiĝis: la ordinaraj Solveig Edvardsson kaj Bertil Åkerberg kaj la anstataŭantoj Gun Gerdman kaj Nils Erik Kristoferson. Tiu ĉi lasta estas nova je tiu posteno.

SEF estos reprezentata ĉe UEA per du komitatoj: Märtha Andréasson kaj Roland Lindblom.

En la Sveda Esperanto-Instituto SEF havas du estraranojn: Jan Strönne kaj Åke Blomberg, kaj du anstataŭantojn: Karin Strandberg kaj Mira Wiechowska.

Ankaŭ elektopreparan komisionon la jarkunveno elektis. En ĝi estas Tore Johansson, Lisbet Andréasson kaj Franko Luin, kiu estas kunvokanto.

Ĉar du longtempaj estraranoj decidis resti ekster la estraro estonte, nome Sven Alexandersson kaj Franko Luin, Roland Lindblom per librodonaĵo esprimis la dankon de la federacio pri la laboro farita de ili.

DISKUTOJ PRI LABORO FAROTA

Plej multan tempon oni bezonis por diskuti pri la deko da proponoj al la jarkongreso. La unuan proponon, de Ulla Luin, ke SEF admonu siajn membrojn aktive partopreni en la diskutgrupoj de la UK oni akceptis kun la aldono de Lennart Åberg, ke SEF ankaŭ instigu al diskutado dum venontaj UKj.

La propono de la Esperantoklubo de Hallsberg, ke SEF pretigu televidajn bendojn pri esperanto, uzeblaj en la lernejoj, estis principe akceptita. La jarkunveno donis taskon al la estraro formi taŭgan laborgrupon, kiu konsistu el personoj ekster la estraro.

Malakcepto estis la decido de la jarkunveno rilate al propono de Franko Luin, ke oni fondu "Instituton pri internacia komunikado", kiu sisteme interesigu pri tio, kio okazas en la altlernejoj.

Ankaŭ la propono de la klubo de Jönköping pri presado de membroregistro malakceptiĝis, simile kiel la jaron pli frue, malgraŭ longdaŭra dis-



Kelkaj kongresanoj en Hallsberg: Kerstin Rohdin, Sten Gustavsson, Roland Lindblom, Anna Alamo, Stella Lindblom kaj Janko Luin.

kutado pri eblaj manieroj fari tian registron.

Malakcepto kun demando-signo — tiel oni povas karakterizi la decidon pri la propono el Jönköping, ke oni aldonu iom da verda dekoracikoloro al *La Espero*. La estraro atentigis, ke tiu demando eble solviĝos de si mem, kiam ni havos propran presejon.

Longe oni diskutis pri la propono de Lennart Åberg rilate al reorganizo de la Sveda Esperanto-Instituto. La decido fariĝis akcepto de la propono de la estraro, nome ke la jarkunveno taskigu ĝin, t e la estraron, prezenti proponon pri nova organiza formo de Sveda Esperanto-Instituto, kunlabore kun la aliaj membro-organizoj.

Franko Luin proponis, ke mono siatempe kolektita por statuo en Gotenburgo kaj administrata de SEL estu transdonita al Eldona Societo Esperanto por eldono de nova vortaro. Tiun proponon oni akceptis, kun la aldono de Jan

Strönne, ke oni pluesploru la aferon, ĉar Eldona ĝuste nun ne bezonas la monon.

Åke Rohdin proponis kunlaboron kun aliaj organizaĵoj. Tion oni akceptis kaj taskigis lin mem formi laborgrupon.

Jönköping ankaŭ proponis, ke SEF eldonu librojn pri teknikaj temoj. Oni ne akceptis tion, sed la respondo de la estraro, ke tio estas tasko de internacia kunlaboro kaj de Eldona Societo Esperanto.

Per tiuj decidoj finiĝis la jarkunveno, kiu devus esti nur parentezo en la jaro de la granda Universala Kongreso en Stokholmo, sed kiu en la vero estis signifoplena kunveno de la svedaj esperantistoj. Ankoraŭ unu decidon tiu jarkunveno faris: kongresi venontjare en Malmö en iom pli luksa kaj iom pli longa kadro. Tiam SEF festas siajn 75 jarojn, kaj decas festi tion iom digne. La organizanta klubo de Malmö (kiu mem festas 75) akceptis fari tion. Do ĝis revido en Malmö la 5an, 6an, 7an kaj 8an de junio 1981!

INTE FÖR TIDIGT!

Nu är det precis lagom tid att betala nästa års avgifter till UEA. Du betalar:

155 kr om du är *MA*, dvs medlem med årsbok och tidning *Esperanto*

62 kr om du är *MJ*, dvs medlem med årsbok. Du kan även göra ett extra tillägg till din avgift och stödjer UEAs arbete.

310 kr betalar du extra om du vill stödja UEA. Då blir du medlem i *Societo Zamenhof*.

Du betalar till postgiro **14 74 29 - 5**, Esperantoförbundet, Specialkonto. För förfrågningar ring till Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, tel. 040 - 91 63 09.

SEJUs brev till SÖ får positivt svar

Det är nog inte många som vet att SEFs ungdomsförbund, SEJU, samlat namnunderskrifter under ett förslag till Skolöverstyrelsen (SÖ) om att göra esperanto till C-språk i skolan. *La Espero* har säkert sin del i att det blev så liten publicitet kring SEJUs aktion. Hur som helst: 1500 namn lyckades man få ihop, av dem 600 i Västerås, och dessa överlämnades till SÖ i somras. Här nedan följer både SEJUs brev till SÖ och SÖs svar till SEJU. Läs igenom dem, även om du tycker att de är väl långa!

TILL SKOLÖVERSTYRELSEN

Vi vänder oss till Skolöverstyrelsen med ett förslag angående C-språksundervisningen i gymnasieskolan. Med hänvisning till nedanstående och till bifogade namnunderskrifter, vill vi föreslå Skolöverstyrelsen att allvarligt överväga detta, och som en logisk följd fatta ett beslut om att även det internationella språket esperanto skall kunna väljas som C-språk på samma villkor som de redan förekommande språken.

Till C-språken räknas ju även de sk "hemspråken", och på grund av esperantos internationella karaktär förekommer det förstås inte ofta som hemspråk, men ett internationellt språk måste alla ha rätt att få lära sig!

Alla nationalspråk är ganska besvärliga och tidsödande att lära sig. Som säkert är bekant för flera av Skolöverstyrelsens ledamöter, har experiment i parallella klasser med undervisning i esperanto respektive ett främmande nationalspråk givit vid handen, att samma språkbehärskning av esperanto uppnås på en femtedel-/sjättedel av den tid som tarvas för samma nivå inom det andra språket.

Som säkert är bekant, är språk de ämnen som kräver mest studier, innötning och repetition. För många elever leder detta till att språkstudierna förlorar sitt intresse, vilket är negativt för alla. Om man skulle ha möjligheten att välja esperanto som C-språk, skulle detta i många fall leda till att intresset bibehölls, i och med att man inte behöver lika

mycket arbete för att komma in i språket ordentligt.

Därtill kommer att esperanto är ett synnerligen lämpligt objekt vid studier i ämnet "allmän språkkunskap", då det med sitt verkligt internationella ordförråd och klara grammatik tydligt visar vad ett språk är och hur det fungerar.

Genom sin enkelhet kan esperanto redan efter ganska kort tids studier användas aktivt vid korrespondens och därigenom utvidga möjligheterna till studier av problem även utanför den engelskspråkiga världen.

Visserligen pekar några av dessa fakta på att esperanto borde ersätta engelska som inkörsport till främmande språk snarare än att utgöra avslutningen på språkstudierna. Detta vore givetvis ett ännu bättre mål, men vi inser att de personella resurserna för närvarande inte skulle klara av den enorma efterfrågan av esperantolärare, som då skulle uppstå. Däremot är det fullt rimligt att klara av denna "mjukstart" via C-språksalternativet.

Det är ett sorgligt faktum, att man i Sverige visar sig så oförstående mot esperantos möjligheter och har en sådan övertro på engelskans fördelar. I många länder är situationen helt annan. Medan vi i Sverige accepterar att på TV höra utländskt tal och tvingas läsa textremsan för att förstå meningen, tvingas läsa instruktioner i såväl arbete som hobby (t ex byggmodeller för barn) på engelska, eller t o m själva förser våra produkter med engelsk text, oavsett om de skall på export eller ej, försöker man i andra länder, i synnerhet utvecklingsländerna, komma ifrån beroendet av sina f d kolonialspråk och i stället skapa sig en egen identitet och värna om det egna språket.

Utan anspråk på fullständighet följer här en uppräknig av länder, platser och skolor där esperanto undervisas:

Belgien: Brüssel, Fria Universitetet; får förekomma även i andra skolor.
Bolivia: La Paz, Universitetet.
Brasilien: Frivilligt ämne i

mellanskolor; Luis de Fora-Universitetet; obligatoriskt — esperanto har samma ställning som franska och engelska; Universitetet i Fortaleza, Varra Mansa, Sao Carlos, Santo Andre.

Bulgarien: Fakultativt ämne, officiellt program finns; universitetet i Sofia och Svistov.
Colombia: Tillåtet som fakultativt ämne vid universitetet i Bogotá och Medellín.

Finland: Universitetet i Helsingfors och Åbo samt enstaka grundskolor.

Frankrike: Vid universitetet i Aix-en Provence, Clermont-Ferrand, Pau, Rennes och dessutom i åtta folk- och realskolor.

Iran: Lavinartad tillströmning de senaste två-tre åren. Särskilt stark efter revolutionen. Därför svårt att säga på hur många ställen undervisning förekommer.

Island: På ett flertal skolor.

Italien: Undervisning på olika skolstadier, t ex i Bologna.

Jugoslavien: Fakultativ undervisning vid universitetet i Zagreb, Split, Belgrad; realskolor i Split (3 st), Niš (2 st) och Struga (2 st).

Kanada: Får undervisas i skolorna, inga orter nämnda.

Korea: Vid tolv (!) universitet.

Madagaskar: Icke-obligatoriskt ämne vid alla högstadier.

Nederländerna: Fakultativt ämne på realskolor; frivilligt ämne vid universitetet i Amsterdam, Nijmegen och Ede.
Norge: förekommer som tillvalsämne.

Nya Zeeland: Realskolor i fem städer.

Polen: Examensämne vid universitetet i Krakow, Lublin, Szczecin, Toruń, Kiele samt frivilligt ämne i olika mellan- och högstadier samt gymnasier.

Schweiz: Genève.

Sovjetunionen: Tillåtet i skolorna i Estland, Lettland och Litauen. Universitetet i Tartu och Ufa (obligatoriskt).

Spanien: Obligatoriskt ämne och examensämne vid universitetet i La Laguna.

Storbritannien: Statlig examen; får undervisas som obligatoriskt ämne inom schemat; undervisning i Liverpool och Southampton, dessutom i 17 mellanstadieskolor; radiokurser sänds från vissa universitet.

Ungern: Mellanstadiet/högstadiet: frivilligt ämne inom ordinarie schema; universitetet i Budapest: obligatoriskt som tredje ämne; ytterligare fem universitet.

USA: Får undervisas i skolorna; högstadiet: San Francisco, Baltimore (2 st), Lebanon, Pittsfield; universitetet i San Francisco, Washington, Wilmington, Provo, Elizabethtown.

Venezuela: Universitetet i Caracas.

Västyskland: Folk- och realskolor i Paderborn-distriktet samt universitetet i Hamburg, Saarbrücken, Münster och Neuwied.

Österrike: Wien: Indogermanska Institutet och Tolkinstitutet (obligatoriskt); fakultativt ämne vid gymnasiet 3:e och 4:e klasser i Wien, Innsbruck, Salzburg och Graz.

Östtyskland: Fem högskolor samt Berlin-universitetet (femton obligatoriska föreläsningar).

Terminologin kan variera, varför det är svårt att avgöra vilken svenska skolform som närmast motsvaras av de uppgivna. Det förefaller emellertid som om det oftast förekommande stadiet utöver universitetsnivån är något,

LA VIRO EN LA MORTOTUKO

i översättning av biskop Sven Danells bok "Mannen i svepeduken" kr 25,—

En oerhört intressant bok, som inte bara beskriver de fakta, som talar för svepedukens äkthet, utan som också i detalj klargör omständigheterna kring Jesu lidande och korsfästelse.

Förmedlar även annan litteratur och grammofoonkivor. Begär prospekt!

FÖRLAG GRÖNA STJÄRNAN
Landerigatan 7, 416 70 Göteborg
Tel 031 - 19 37 90 • Postgiro 8 84 51 - 0

som motsvarar högstadiet-/gymnasiet/gamla realskolan och undantagsvis mellansta-diets högre klasser.

Ovanstående summering är, som sagt, troligen ganska ofullständig, men ändå visar den att man på ett helt annat sätt än i Sverige tar frågan om ett internationellt språk på allvar. Det är på tiden att Sverige följer med i denna internationella utveckling!

För Sveriges del är esperanto högaktuellt, eftersom vi i augusti 1980 är värdland för den 65:e årliga kongressen för världsesperantoförbundet. En av de få kongresser, som klarar sig utan simultantolkning för de ett par tusen som brukar komma! Många fack-organisationer kommer att sammanträda, bland annat lärarnas esperantoförbund, ILEI, och nog vore det en fjäder i hatten för Sverige att kunna visa gästgärdande fackfolk inom undervisningen, att även vi vaknat och insett hur nödvändigt ett neutralt, lätt-lärt och väl fungerande inter-nationellt språk är för framtiden (ja, redan nutidens)

alltmera ökande kommunika-tionssträvanden på det inter-nationella planet!

De bifogade namnen har av diverse orsaker, bl a våra små resurser, endast samlats in på ett fåtal platser, plus några få listor lite här och var. Vi vill med dem visa att det existerar ett intresse för att införa möjligheten att få studera esperanto i skolorna.

Vad vi föreslår Skolöverstyrelsen är alltså:

1. Att esperanto införs i gymnasieskolan som C-språk. Om inte på samma villkor som för tyska, franska, ryska och spanska, så åtminstone som för portugisiska, italienska och finska, samt att information skall utgå till eleverna om möjligheten att läsa esperanto i gymnasiet.
2. Att, om esperanto efter några års försök visar sig vara bra som C-språk, esperanto skall kunna väljas som tillval-sämne i grundskolan i enlighet med Lgr 80.
3. Att esperanto används för studier i ämnet Allmän språk-kunskap.

Skolöverstyrelsen svarar:

ESPERANTO I SKOLAN

Vid den internationella esperantokongressen i Stockholm den 2 — 9 augusti 1980 överlämnade Ni till SÖ en skrivelse med förslag att esperanto införs som C-språk i gymnasieskolan och i andra hand som tillvalsämne i grundskolan samt att språket "används för studier i ämnet allmän språkkunskap".

Ett införande av esperanto i gymnasieskolan måste bedömas i samband med det totala språkutbudet. Hela frågan om språkorganisationen har regeringen hänskjutit till den sittande gymnasieutredningen, som enligt uppgift kommer att avge ett principbetänkande under år 1981. SÖ kommer att översända kopia av Er skrivelse till utredningen för kännedom.

Emellertid vill SÖ påpeka att enskilda elever genom specialarbetet i gymnasiesko-lans sista årskurs av de 3- och 4-åriga linjerna har en möjlig-het att fördjupa sig i esperan-to. På de orter där försöks-verksamhet med ramtimplaner med obligato-riska och valbara timtal före-kommer kan likaså, efter kommunens förslag och SÖ:s godkännande, esperanto stu-deras. Detaljer om den sist-nämnda möjligheten kan in-hämtas i Skolöverstyrelsens författningssamling (SÖ-FS) 1979:62.

Då det gäller grundskolan öppnar den av riksdagen antagna revisionen av läroplanen (Lrg 80) möjligheter att erbjuda kurser i esperanto dels på högstadiet inom ramen för de fria aktiviteterna (Mål och riktlinjer för grundskolan, s 23), dels på högstadi-et som tillvalsämne (do s 37). I det senare fallet ställs krav på att den som undervisar har allmän lärarbehörighet. I en reviderad upplaga av SÖ:s specialinformation "Kursplanemodeller för tillvalet enligt Lrg 80" kommer den sist-nämnda möjligheten att på-pekas.

Information om esperanto kan på ett naturligt sätt komma in såväl i orienteringsäm-nena i grundskolan som i äm-net samhällskunskap i gymnasieskolan i samband med behandlingen av inter-nationaliseringssträvanden samt inom ämnet allmän språkkunskap. Inget hinder föreligger heller att informa-tion om språket och en orien-terande introduktion lämnas under en eller flera timmar till förfogande.

SÖ avser att på lämpligt sätt fästa skolornas uppmärksamhet på dessa olika möjligheter att beakta esperanto.

Med vänlig hälsning
Birgitta Ulvhammar
/Gunnar Holmberg

PERSONE

—Ĉaŭ! mi diris al li

En la telefono aŭdiĝis la voĉo de ne tute nekonata esperan-tisto.

—Ĉu vi scias, kion mi faris?

—Mi ne scias, kiel mi sciu tion? mi respondis iomete kolera, ĉar ĉiam li komencas siajn interbabilojn per tiu stulta demando.

—Vi konas Lotto, ĉu ne?

Memkompreneble. Kiu estas tiu feliĉulo, kiu evitis vidi la avasan reklamadon pri tiu nova ludo de la svedoj.

—Vidu, mi elektis iom da ciferoj por tiu Lotto, tiom ke taŭgas por dek kronoj kaj mi pagis por dek semajnoj. Vi scias, ke tio eblas.

Mi fariĝis ankoraŭ iom pli kolereta. Sur la kuirforno io bolis kaj mi timis ...

— Sed mi ne skribis mian nomon sur la kuponon, sed la adreson de SEF; tiel ke se estos lotumitaj tiuj ciferoj, kiujn mi skribis, SEF ricevu la monon.

Mi devis diri, ke tio estas tre bona ideo, sed pensis samtempe, ke tiuj cent kronoj (dek oble dek; mi ankoraŭ kapablas kalkuli sen uzo de kalkulilo), nu, ke tiuj cent kronoj estus pli certaj ĉe SEF ol la "ebla" miliono, kiun Lotto tiel energie reklamas. Sed mi ne diris tion, ĉar lia ideo, por unu fojo, ne estis tiom malbona.

—Vi ne estas stulta, mi diris anstataŭe, kaj mi aŭdis lin rideti je la alia flanko de la parolilo.

—Faru simile, li diris kaj aldonis: —Ĉaŭ!

—Kio ĉaŭ? mi demandis.

—Ĉaŭ! Signifas saluton! Estas la samo kiel "hej" en la sveda. Ĉu vi ne konas tiun vorton?

Mi fakte ne konis kaj diris tion. Ho ve! Dum kvarona horo li prelegis al mi pri la avantaĝoj de "ĉaŭ", kiun oni povas uzi kaj je la alveno kaj je la foriro. La supo sur la kuirforno donis al mi sufiĉajn argumentojn por igi lin ĉesi.

—Ĉaŭ! mi diris al li.

—Ĉaŭĉaŭ! li respondis en sia tro energia tono.

Eta Mi

Invito al inaŭguro

Post jaroj da restado sur la dezirlisto de ĉiuj esperantistoj en Svedio jen ĝi estas: ESPERANTO-CENTRO meze de Stokholmo! La adreso estas Brunnsgratan 21, la plej proksima stacio de la metroo estas Hötorget. Venu viziti ĝin! La 22an de novembro okazos inaŭguro de la nova ESPERANTO-CENTRO. Bonvenon ek de la 12a horo kaj ĝis la 20a! Venu kaj babilu, kafumu, kantu, konatiĝu! Vi notis la daton, ĉu ne? La 22an de novembro inter la 12a kaj la 20a horoj.

ESPERANTO
CENTRO

Sola mi iras

Sola mi iras laŭ mia vojo.
Pli kaj pli longe ĝi etendiĝas.
Kaŝas lontane sin mia cel'.
La tag' malhelas,
noktas ĉielo.
Steloj eternaj videblas jam nur.
Mi ne priplendas la tagon fuĝantan.
Mi la venantan nokton ne timas.
Ĉar de la amo la mondon pleniga
falas en koron mian radi'.

Valso de Böljeby

Vent', vent' dumfluge vi
kantu, amik' de lukta bru',
kantu kun sibla kri',
flavas folioj bele.
Jen en malfrua sol'
pompas sub kverkoj aro plu,
restas en ludpetol',
batal' kaj danĝer' fidele.

Kor', kor' sub jaka drap'
batas kun streĉa energi',
firme sub vil' de l'kap'
logas okuloj hele.
Jen, de balkona bret'
ŝtele tra ŝirma ruĝfoli'
de knabinar' ridet'
flugas al viroj bele.

Tuj, tuj sur kamp' ĉe l'kort'
vin rendevurenkontos mi.
Kun uragana fort'
sopiras la kor' alcele.
Ĉu kun ankora flam'
iras en vent' malvarma vi?
Longe mi mutis jam,
ŝprucos la vort' ribele.

Sun', sun' en kverkoj nun
faru por balo torĉojn vil'
Ombras jam aŭtun',
rulas la ondoj pele.
Nin la printemp' ne plu
ravas per zuma melodi'.
Viv' en ventkirla bru'
dancas kun ni kruele.

Mildas vi, stelar'

Mildas vi, stelar',
en l'universmalhelo brile,
lumu daŭre, ĉar
vin trafos iam mi facile.
Pacon sentas mi
kun vi en proksim'
kaj en la anim'
ekbrulas via vera flam'.
Lumu, lumu vi,
venu kun esper',

reekflamu ver',
fidela bild' de l'ĉielam'.
Plendas peze ventsusur'
en la arbarmalhelo.
Ĉasas ŝtorma muĝmurmur'
en korobskura gelo.
Via klartrankvil'
freŝigos l'ardon de l'anim',
kaj kvietlangvor'
ekloĝos en la kor'.

Kvar kantoj

Dum la Internacia vespero
de la 65a UK Hans Lindén kantis
kvar kantojn el la sveda
literaturo. Ĉi apude vi trovas la
tekstojn de tiuj kvar kantoj.
La tradukon de Valso de Böljeby
faris Malin Holmström-Ingers,
la ceterajn tradukis Franko Luin.

La avino kaj la papago

Meze de l'urbo malnova
— Klockgjutargränd domo kvin —
loĝas kun sia papago
vere maljuna virin'.

Verde sin vestas l'avino,
verdas la aĝa papag'.
Ili malsamas cetere
kaj laŭ la pens' kaj ag'.

Se almozulo alvenas,
ili kverelas pro li.
Ĉar tre avidas l'avino,
sed la papago malpli.

Ofte en jaŭdoj dum teo
ili en sia salon'
akre disputas pri disko
ludota sur gramofon'.

Marŝojn nur ŝatas l'avino,
marŝojn kaj ne kion ajn,
dum la papago preferas
Wien, Wien nur du allein.

Ili tuthore disputas
pri l'ĉiutaga fumrajt':
piron fajrigas papago,
ŝi unu Virginia Light.

En la dimanĉ' ili ludas
kartojn kun vera obstin'.
Sed la papago fuŝludas,
ĝis ĝin malkovras l'avin'.

"Fil!" ŝi ekkrias kolere.
"Fi, via birdabomen'!"
Kaj la papago klopodas
honti laŭ sia kompren'.

Jen ili vivas kverele,
jen laŭ trankvila rutin',
l'avino kaj ŝia papag' en
Klockgjutargränd, domo kvin.

Tolv nya kurser efter kongressen

Visst var det jobbigt med Esperantokongressen, både långt före och under själva kongressveckan, och en del arbete knutet direkt till kongressen återstår för all del ännu. Den PR kongressen gav, för Stockholm i synnerhet men säkert också för hela landet, är ändå en god lön för mödan. När startade vi senast tolv nybörjarcirklar i Stockholm? Kanske hösten 1934?

ABF Söder råkdade i bryderi, när anmälningarna till esperanto började närma sig 30; näst engelskan det största språket i det ABF-distriktet. Men lärar- och lokalfrågan löstes och två grupper med tillsammans 28 deltagare är nu igång.

Medborgarskolan har 16 esperantostuderande fördelade på två grupper och på arbetesperantisternas klubb på Barnhusgatan håller man igång med tre grupper med tillsammans över 20 deltagare.

I Tyresö söder om Stock-

holm har man två grupper, 15 deltagare. Drar man sedan gränsen för Stockholmsområdet ända ner till Nynäshamn, får man nämna en grupp på 8 deltagare i Ösmo och två grupper i ett högstadium i Nynäshamn. Det sista är inom ramen för fria aktiviteter: 20 elever läser nu esperanto.

Till den här uppräknings vill jag också tillägga att långt ifrån alla som önskat har kommit med i någon studiecirkel, på grund av för få anmälningar på den aktuella studieplatsen. Vi har på olika sätt försökt hjälpa dem att komma igång med självstudium. Den 11 oktober samlades en liten grupp och fick 'start-hjälp' med läroboken "Ek!".

Till sist vill jag gärna tillägga att det är viktigt, att vi tar vara på intresset *nu omedelbart*, medan medvinden blåser. Den information kongressen gav faller snart i glömska.

Birger Viggen

Kvin novaj libroj legitaj de Salex

Juhan Liiv:
AL ABELUJO ĜI FLUGAS

Elektio kaj traduko de Hilda Dresen. Eldonis Eesti Raamat, Tallinn 1980

Juhan Liiv 1864 — 1913, jen la tempokadro por elstara estona poeto. Tamen la 20 lastaj jaroj forfalas pro grava malsano kaj lia verka periodo limiĝas je jardeko en la fino de la antaŭa jarcento.

Granda parto de lia poezio estas pura naturliriko, sed ofte enmiksas sin arda amo al la patrujo — Estonio, malgranda, malriĉa, subpremita, sed kara super ĉio en la mondo. Kvankam pasis jarcento de tiam, la poemoj ankoraŭ sonas aktualaj, kaj ni povas gratuli al niaj estonaj amikoj, ke tiu trezoro nun estas atingebla por la esperanta publiko.

La tradukoj de Hilda Dresen estas laŭ senmanka kaj klasika stilo.

Karl Marks:
MIA KREDO

Kun pritraktado de Frederik Engels. Eldonis Esperanto Editions, Hastings, Anglio, 1980

Modesta kajero kun tezoj de Marks kaj kompletigaj klarigoj de lia disĉiplo Engels. La bazo de la socio estas la ekonomia strukturo (materialismo historia koncepto). "Ne la konscio de la homoj destinas ilian vivmanieron; male, ilia socia vivo destinas ilian konscion". (Ĉu ne koncepto estas la ĝusta termino?)

La tezoj situas sur sufiĉe alta teoria nivelo, kaj ne estas ĉiam tuj percepteblaj. La mallonga teksto de la libreto ne sufiĉas por doni klaran bildon pri la pensosistemo de Marks, kaj se oni ne jam konas la ĉefan enhavon de la libro "Das Kapital", oni ne estas multe pli klera post tralego. Al kio celas la libreto? Ĝi povas esti nur enkonduko kaj instigo al pli

serioza studado de la verkoj de la patro de socialismo.

**KUMLA
ESPERANTOKLUBB
LA ESTONTO**

Historik sammanställd av Tage Tapper

Tio ĉi estas bela jubilea kajero, kiu ricevis ekonomian subvencion de la komunumo. Ĝi baziĝas sur pli fruaj jubileaj kajeroj, kiuj tamen ne estis tiel belaj kiel la nuna. La kajero donas amuzajn erojn el la ŝanĝigema duona jarcento de la klubo, ne malplej pri la kuraĝa teatra grupo. Kiel pioniroj elstaras Fritz Ström kaj Bengt Söderlund.

**HISTORIO
DE ESPERANTO**

Skizo, kompilita de d-ro Karl Beckmann.

Eldonis Aŭstria Esperanto-Instituto, Vieno 1980?

Jen simpla enkonduko al la evoluo de la esperantomovado. Ĝi estas aranĝita laŭ epokoj, ekzemple "slavagermana" (1887 — 1896), la intermilita epoko (1919 — 1939). Tio donas naturan disponon al la prezentado. Ĝi ankaŭ traktas la tempon post la dua mondmilito.

La broŝuro estas utila al ĉiu

esperantisto, kiun interesas nia historio, kaj precipe al ekzamenotoj.

Lingvaj komentoj: la verbo komenci estas uzita en ne-transitiva senco. Islando estas kalkulita kien ekstereŭropa lando. Oni skribas "honorigi"; honoro jam estas transitiva. Ĝenas la abunda uzo de "ties" anstataŭ lia, ĝia, ilia ktp.

**Peter Altenberg:
SKIZOJ**

Tradukis Grete Breunlich. Eldonis Aŭstria Esperanto-Instituto, Vieno 1980

Richard Engländer estas la vera nomo de la aŭtoro. Li estis verŝajne sufiĉe egocentra kaj ne taŭga por ordinara laboro. Boheme li studis la ĉirkaŭan mondon, kaj el tio rezultis la skizoj, kiuj formas ĉi tiun libreton. La skizoj estas kvazaŭ bonhumoraj anekdotoj.

Pri la lingvo de la tradukoj mi havas kelkajn rimarkojn, ekzemple: "porcion framboĉokoladon" p. 11, "sortoj de aŭstriaĵaj cigaroj" p. 12, "la fakto erudiciito" p. 13, "kiel ĉarme vi ĝin havas" p. 16, "miloj da mono" p. 20, kvieti anstataŭ trankvila p. 26, "sorto de senfine migranto" p. 28. Pli zorga lingva kontrolo estas dezirinda.

Salex

TABULO

TILL BRASILIEN?
Du kanske funderar på att åka till Brasilien och nästa års esperantokongress? I så fall har du nytta av följande avgifter som gäller fram till 31 december 1980:

1. Icke medlem i UEA	391 kr
2. Medlem med årsbok	346 kr
3. Medlem med årsbok och "Esperanto"	272 kr
4. Make/maka till (1)	274 kr
5. Make/maka till (2) eller (3)	241 kr
6. Ungdom t o m 20 år	120 kr
7. Heltidsstuderande t o m 30 år	195 kr
8. Synskadad	155 kr

Anmälningsblanketter kan du få från Asta Schaedel, V. Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, tel. 040-91 63 09. Du betalar till postgiro 14 74 29-5, Esperantoförbundet, Specialkonto. Anmälningsblanketten skickar du till ovanstående adress.

Din gåva till SEF: arbete och initiativ

Esperantoförbundet firar nästa år 75 år. Då måste vi visa upp ett effektivt och slagkraftigt förbund. Det innebär bl a

1. att vi måste försöka öka medlemsantalet både i våra föreningar och i Esperantoförbundet. Intresserade, kursdeltagare, familjemedlemmar blir bäst informerade om esperanto om de är med.

2. att vi måste öka antalet direktanslutna medlemmar i UEA. Ett starkt UEA betyder också ett starkare SEF.

3. att vi måste öka antalet delegitöj, vicdelegitöj och fakdelegitöj i UEA. Det internationella nätet som UEA har byggt upp är av stor vikt för hela esperantorörelsen. Att vara med i det och använda sig av det innebär att man får praktiskt nytta av esperanto på ett helt annat sätt än annars. Diskutera i din förening vilka som kunde vara delegitöj och i vilka ämnen. Asta Schaedel i Malmö lämnar gärna svar på era frågor; det gör också Esperantoförbundets expedition i Stockholm. Du hittar telefonuppgifter och adresser på olika ställen i detta nummer.

Det är 1981 som Esperantoförbundet firar sitt jubileum, så allt det här bör ske så snabbt som möjligt.

Ett märke från de unga



Har du redan sett det här snygga röd-vit-gröna märke som det internationella ungdomsförbundet TEJO använder på sina försändelser? Det sägs att försäljningen av märken går så bra att hela upplagan snart är slut — men inte riktigt slut än. Tio märken, som är självhäftande,

JESONE

kostar 2,50; för 7 kronor får man hela 50 märken. Du kan betala till postgiro 92 75 20 - 7 eller skicka summan i frimärken till Jan Olof Svensson, Madskogen Pl 343, 52200 Tidaholm, så får du märkena på posten.

Pli ol 20 000 poŝtaĵoj

La poŝto donis al ni post la Universala Kongreso la informon pri senditaj poŝtaĵoj dum la kongreso, kiuj ricevis la specialanongresan poŝtstampon. Entute estis stampitaj 21 778 sendaĵoj, el ili 16 650 en la kongresoj mem. La aliaj 5128 estis antaŭmenditaj de kolektantoj. La poŝto pritraktas tion kiel tre tre bona rezulto, pro kiu ili havis vere multe da laboro.

Ne plu estas inter ni

En Jönköping mortis Knut Jensie la 8an de aŭgusto, 86-jara. Dum pli ol 30 jaroj li gvidis kursojn kaj aliajn informajn aranĝojn. Dum la lastaj jaroj li ne povis partopreni en la esperantolaboro, sed la intereso por nia lingvo restis forta ĝis la lasta tago. Sian ampleksan esperantobibliotekon li donacis al la klubo.

★★★

En Norrköping forpasis Leander Tell, kiu jam en 1905 fondis kun Sven Jerring esperantoklubon en sia lernejo en Norrköping. Je la morto li estis 85 jara. Dum la lastaj jaroj li fariĝis plej konata kiel esploranto de grotoj, pri kio li eĉ verkis libron en esperanto, sed konata ne nur inter esperantistoj sed ankaŭ ĉe la sveda publiko.

Dum sia vivo li estis librovendisto kaj industriisto; pri grotoj li ekinteresiĝis post la pensiigo. La famaj grotoj de Lummelunda tre interesis lin kaj li estas la unua, kiu malkovris stalagmitojn en ili.

La sveda esperantomovado perdis du gravajn amikojn per la forpaso de Knut Jensie kaj Leander Tell.

Daŭre vivas Klubo Cent

Vi ne forgesis pri Klubo Cent, ĉu? Kelkaj bone memoras pri tiu ĉi klubo, kiu kontribuas ekonomie al SEF per regula jara donaco je cent kronoj. Dum la komenco de la jaro la jenaj personoj "pagis sian membrotizon":

Alice kaj Nils Johansson, Norrköping
Jan Strönnö, Malmö
Ivar Andersson, Tranås
Skövde Esperantoklubb
Gustav Nygård, Göteborg
Jan-Olof Svensson, Tidaholm
Barbro Karlsson, Lysekil

Erik kaj Linnea Edsenius, Nybro
Hässleholmsortens Esperantoklubb
Herbert Rosendal, Vänersborg
Karl Gustafsson, Bergvik
Anna Ericson, Sundsvall
Lennart Lagerkrantz, Falun
Kristinehamns Esperantoklubb
Kumla Esperantoförening
Henry Almar, Uddevalla
Martha Colliander, Stockholm
Eugen Rytenberg, Uppsala
Erik Lundvall, Borlänge
Karl Axelsson, Huddinge
Helsingborgs E-förening

Tiu ĉi listo nur temas pri la komenco de la jaro. Se vi pagis kaj ne estas en ĝi, vi trovos vian nomon en la venonta numero de *La Espero*.

SEF dankas al ĉiuj "membroj" de Klubo Cent kaj bonvenigas pliajn. Oni fariĝas membro tre facile: oni pagas cent kronojn al la poŝtgira konto 20 12 - 3, Esperantoförbundet. Tio estas ĉio.



Behöver du hjälp med dina prenumerationer? Låt Esperantoförbundet ta hand om det! Du sätter in prenumera-tionsavgiften på det nya postgirokonto 59 67 68-2, Esperantoförbundets Prenumerationskonto så sköter vi resten. Prenumerera på följande tidningar:

Heroldo de Esperanto	63,-
Kontakto	46,50
Oomoto	22,-
Sennaciulo	85,-
Literatura Foiro	38,-
Kulturaj Kajeroj	35,-
Norvega Esperantisto	16,-
El Popola Ĉinio	
t o m 31 januari 1981:	
1 år	20,-
2 år	35,-
3 år	50,-

ESPERANTOFÖRLAGET

Det händer saker i Malmö

Nu är det officiellt: två av hörnstenarna i den svenska esperantorörelsen har tänkt sig att ta det lite lugnare i framtiden. Båda är från Malmö och svarade till helt nyligen för mycket viktiga delar av verksamheten. Den ena heter Ester Andrén, den andra Anna-Greta Strönnö.

Ester Andrén har i ett par årtionden svarat för alla kontakter mellan SEF och UEA. Alla anmälningar till världskongresser, till UEA, alla handlingar om delegitöj och liknande har passerat hennes händer. T o m allt jobb med anmälningar till årets kongress, med nära 500 svenskar, tog Ester hand om. I god tid

före kongressen har hon talat om sin önskan att ta det lugnare, så fr o m i höst heter den nya ansvariga för dessa kontakter Asta Schaedel, även hon från Malmö, där hon är delegitöj. Hennes adress är Rönneholmsvägen 42 B, 217 41 Malmö, telefon 040 - 91 63 09. Det är bäst att du lägger det på minnet, eftersom det blir till henne du kommer att vända dig i fortsättningen beträffande alla frågor som rör UEA och de internationella kongresserna. Asta gör detta jobb åt SEF som är peranto för UEA i Sverige.

Anna-Greta Strönnö har man kunnat i ett par årtionden hitta på Esperantoförla-

get, där hon tidigare ensam, under senare år med lite hjälp, sköt alla beställningar från svenska esperantister och från köpare utifrån. Hon har officiellt lagt av för några månader sedan, men det är fortfarande hon som svarar i telefon, när man ringer till förlagets expedition. Wivi Nilsson fortsätter som tidigare på expeditionen.

Dessa förändringar innebär i övrigt inget så mycket nytt. Adressen till förlaget är densamma, postgironumret likaså. Nytt är att det finns ett postgironummer till, nämligen för prenumerationer. Det hittar du i en särskild annons på annan plats.